NIA VOĈO
Organo de Madrida Esperanto-Liceo
Atocha 98-4ª.28012 Madrid
(91) 530 87 98 persone lunde vespere
aliajn tagojn, aŭtomata respondilo
Redaktas kaj eraras Lupe Sanz
SEPTEMBRO-OKTOBRO 1997

**7-A INTERNACIA ESPERANTO-KONGRESO** (Informas A. Casquero)

Ekde la 8-a ĝis la 13-a de julio 1997, okazis en Valencia la 7-a Internacia Esperanto-Kongreso, aŭspicita de Monda Turismo, kune kun la 7-a Eŭropa Esperanto-Forumo kaj la 56-a Hispana Esperanto-Kongreso, sub la Honora Prezidanteco de al Reĝino Sofia de Hispanio. La sidejo estis la Facultato pri Filologio de la Universitato de Valencio kies estraro afable ne nur gastigis la kongresojn sed ankaŭ aŭspiciis ilin, kaj oferis senpage ĉiun bezonatan servon. La dekanino de la Fakultato mem, D-rino Carmen Morenilla, aktive partoprenis la organizadon.

La kongreson kunordigis Augusto Casquero, Ana Montesinos kaj Gian Carlo FIghiera, kaj ricevis la helpon kaj valoran kunlaboron de multaj aliaj samideanoj inter kiuj ni devas mencii gesignorojn Sempere, Aliaga, Peris, Giménez, Solag, Eduardo, Berta, Raposo, Antonio, Rafa, Araceli, Añó, ktp. Entute Aliĝis 565 gekongresanoj, de 18 landoj, sed fakte partoprenis pli ol 600.

Multe oni povas paroli pri la kongreso, sed se indas ion elstarigi tio estas la ege agrabla kaj familia etoso. Speciala mencio por la esperantistaro, urbestraro kaj tuta popolo de la vilaĝo Cheste, kiu gastigis la kongreson la sabaton 12-a. Tie okazis krom la oficialaj kulturaj programeroj (prelegoj, koncertoj, ktp.), la disdonado de la literaturaj premioj "Francisco Máñez" al la verkisto Antonio Marco Botella, Kurisu Kei kaj Sabira Stahlberg; la giganta "paella", kuirita en unusola ujo por pli ol 600 homoj kaj finmangita kune kun freŝa "sangría" liberaere en bela parko; la katolika Diservo kun partopreno de diversaj korusoj el kelkaj landoj; la surstrata muzika prezentado de esperantistaj muzikgrupoj de diversaj landoj, ktp.

La urbestrino de Valencia, S-rino Rita Barberá, akceptis ĉe la Valencia Urbodomo, la kongresaranon, kaj afable legis saluton en Esperanto. Poste ŝi babiladis kun la ĉeestantoj kun kiuj ŝi fotiĝis.

Ankaŭ nepras mencii kaj gratuli S-rinon María Ángeles Fernández, de Valencio, kiu ricevis la meritítan premion "Klara Silbernik"; la dumkongrese novelektitan HEF Prezidanton, Miguel Angel Sancho, de Madrido; kaj la S-ron Hernández Yzal, direktoro kaj fondinto de la Muzeo de Esperanto de Sant Pau d'Ordal kiu ricevis memorŝildon kiel agnosko de konstanta kaj entuziasma laboro por Esperanto.

Por kompletigi iomete la informon pri la aranĝo, ni kopias artikolon de G.C. Fighiera kiu aperis en la Revuo L'Esperanto. Julio 1997: *Valencio - Miniatura Universala Kongreso - La regionaj gazetoj, radio kaj televid-stacioj de Valencio vaste reliefigis la abundajn artajn kaj kulturajn programojn de la 7-a Internacia Esperanto-Kongreso, kiu tie okazis komence de julio. En tiuj programoj ludis preskaŭ cent geartistoj de 6 trupoj el Pollando, Rumanio kaj Hispanio: grandan sukceson atingis la 40-membra kant-ensemblo de la pedagogia altlernejo de Bydgoszcz (Pollando), la samnombra infana folklora dancgrupo "Plomienie" kaj la folklora trupo de la Aragona Centro, kiu entiziasmigis la ĉeestantoj per siaj vervoplenaj ĵotoj. Ne mankis elektronika muziko en originala pelnumo de Eduardo Vargas "Solo", socikritikaj vers-kantoj de Michael Bronstein (Sovetunio) kaj muzik-prelego de Heras (Hispanio).*

*La kulturaj prelegoj kunigis temoj pri juro (Rafaela Urueña), botaniko (Zvara, Slovakio), informatiko (Miguel A. Sancho), literaturo (Gutierrez, Kubo kaj Miguel Fernández), terapio (Staisiunaite, Litovio), lingvistiko (Antonio Alonso), radio (Pietrzak, Pollando) kaj lingvopolitiko (Fighiera, Italio).*

*La supra listo de la aranĝoj ne estus kompleta se ni ne citus la publikan Cseh-metodan kurson de Zacharias (Slovakio) kaj la prezentadon de la nova verko de la hispan-portugala literatura grupo "Ibere libere" (Fernández, Camacho, Neves, Dek). La kongreso omaĝis en aparta kunveno la forpasintojn Ada Fighiera-Sikorska kaj Juan Carlos Ruiz. Rimarkinde, ke la kongresanoj partoprenis en manifestacio por peti la liberigon de la forrabita skabeno Blanco Garrido, poste murdita de la teroristoj.*

*Pli ol 500 kongresanoj el 16 landoj partoprenis en la kongreso, kiu samtempe estis la 56-a Hispana E-kongreso: la prezidanto de LKK, Augusto Casquero, jam organizis tri sukcesajn E-kongresojn: du naciajn en Madrido kaj Valencio kaj unu universalan en la laste citita urbo (GCF)*

Dum la manifistacio favore la liberecon de Miguel Angel Blanco kelkaj kongresanoj portis parkardon kun la teksto de la 3-a artikolo de la Deklaracio pri Homaj Rajtoj. La teksto estis skribita en esperanto kaj en la lingvoj de la landoj representitaj en la Kongreso. Diversaj naciaj ĵurnaloj aperigis fotografaĵojn de la grupo de esperantistoj.

**FUNDACION ESPERANTO**

La sekretario de la Fondaĵo de HEF informas ke post pli ol 20 jaroj, la Urbestraro de Barcelono, fine, pagis 3.719.333 pesetojn, sumon rezultantan de la heredaĵo Casanovas-Ferrandis. Nun restas pagi la kostojn de la unuaj perditaj pledoj kaj la honorariojn de la advokatoj

## HEF ANGULO

La Ĝenerala Asembleo de HEF okazis dum la kongreso de Valencio. Ni resumas la protokolon: Novan **kotizon** por ordinara membro 4.000 ESP. **Nova estraro**: Prezidanto: Miguel Angel Sancho. Vicprezidanto: José Mª Galofré. Sekretario: Manuel Parra. Vicsekretario: Marcos Cruz. Kasisto: Pedro Garrote. Voĉdonantoj: Augusto Casquero, Miguel.G.Adúriz, L. Hernández. Konsila Komitato: Ana Manero, Juan Antonio Cabezos, José Mª Rodríguez.

S-ro Bernabeu memorigas pri la ĵus **forpasinta samideano kaj membro Francisco Zaragoza**. S-ro Casanoves klarigas pri sia **projekto redakti kaj eldoni grandan antologion**, kiu konsistos el etaj tekstoj, po unu el ĉiuj el la 3.000 mondaj lingvoj, aperante ĉiu teksto en ĝia origonala formo kaj en ĝia esperanta traduko. Li petas al la interesitoj pri la projekto kontakti lin.

La asembleo aprobis jenan **deklaracio**: *Kun hororo, abomeno kaj kolero sciiĝas pri la murdo de unu plia homo fare de ETA-teroristoj (ĉi-kaze, de sinjoro Miguel Angel Blanco). Protestas kontraŭ tia terura atencado kontraŭ la tria artikolo de la Universala Deklaracio pri Homaj Rajtoj, nome "Ĉiu havas la rajton je vivo, libereco kaj persona sekureco". Postulas de ETA kaj de la ceteraj terorismoj krimantaj en diversaj landoj, ke ili tuj kaj definitive metu finon al ĉia krima agado.*

## VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO

Ĉiu-lunde ni kunvenas, ekde la 18,30 horo, ĉe MEL, Atocha 98-4°

Marde kaj jaŭde (18,00 ĝis la 20,30 h) funkcias HEF-CO (Rodríguez San Pedro 13-3°-7). Aliajn tagojn kaj horojn uzu aŭtomatan respondilon aŭ fakson (91) 446 80 79

**Prelegoj:** 19,30 horo en Atocha 98-4°
20-an de Oktobro "HEF-Kongreso en Valencio". Strarano de HEF
17-an de Novembro "Bunta Gvatemalo". Lupe Sanz

**Kursoj:**
Centro Cultural "Maestro Alonso" (kvartalo Ventas). Merkrede 18.30 ĝis 20.00.

## KONGRESOJ KAJ RENKONTIĜOJ

Luis Ojer partoprenis en Aŭgusto en la SAT kongreso okazinta en Aŭgsburgo. Li sendis noton indikante ke SAT, kiel laborista asocio devas malpligrandigi la kostoj de siaj kongresoj (aliĝiloj, loĝado, ktp). Laŭ Ojer la tuta kosto estas nur por richuloj, speciale se la kongresanoj ne loĝas en Germanio kaj devas aldoni la vojaĝ-koston.

5-a Esperanto-Semajno por la Kulturo kaj turismo. 4-11 oktobro. San Carles de la Rápita (Tarragona)
83-a UK Montpeliero (Francio). 1-a ĝis 8-a de aŭgusto 1998
84-a UK Berlino (Germanio). 1-a ĝis 8-a de aŭgusto 1999

## HISPANIO

Dum Aŭgusto vizitis Madridon ĉina esperantisto. Li partoprenis en la vilaĝo Leganés en Foiro pri Ĉinaj Lanternoj". Ankaŭ du gefrancoj vizitis nian urbon kiel turistoj, Marcos Cruz akompanis ilin.

## KRISTNASKA LOTERIO

Jam estas preta Loterio kiu helpas ekonomie al la Liceo: N° 45.680. Vi povas aĉeti biletojn po 200 pesetoj en nia sidejo aŭ peti ilin, ni sendos poŝte (antŭpago necese pere de poŝtmandato)

::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::

ESPERANTO LICEO DE MADRID
Atocha 98-4°
28012 Madrid
Asociación de Utilidad Pública Municipal